Universala Esperanto-Asocio

Voĉdono Kolokvo

Estrara Subteamo: MOVADO

EKO 2016-31 sendita el Budapeŝto la 16an de novembro post reveno el Timişoara

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, la E-gazetaro kaj radiostacioj, listoj kaj unuopuloj (petu senpagan ricevon!).

Por tuja uzo kaj plia diskonigo, kun agnosko de la fonto: EKO de UEA.

## ĜENERALA VOĈDONO

Ĉi tiu okazas nuntempe inter la Individuaj kaj Aligitaj Membroj. Respondoj fizike, poŝte senditaj, devas atingi la Centran Oficejon ĝis la limdato:



**La 15a de decembro 2016**

Sekve, en multaj landoj, la letero devos eniri la poŝton jam en novembro. Ni alvokas al nuntempaj Individuaj Membroj, kiuj ricevis voĉdonilon, tiun resendi ĝustatempe. La voĉoj de la Aligitaj Membroj alvenas pere de la aliĝintaj Landaj kaj Fakaj Asocioj. La maniero laŭ kiu la Landa Asocio determinas la volon de la Aligitaj Membroj estas decidita en ĉiu unuopa lando.

La voĉdoniloj enhavas strikodon. Emfazindas, ke per tio ne eblas ligi la voĉdonilon kun la voĉdoninto. La celo de tiuj kodoj estas malhelpi pli ol unufojan voĉdonadon flanke de unu ricevinto.

La temo de la voĉdono estas modifoj al la Asocia Statuto. La voĉdonilo permesas esprimon de subteno, malsubteno aŭ sindeteno pri dudeko da ŝanĝproponoj, jam kun granda plimulto akceptitaj de la Komitato de UEA.

Antaŭdankon al ĉiu koncernato pro la kunlaboro, kiu estas nepra por la sukceso de la Ĝenerala Voĉdono!

## Kolokvo antaŭenigas nian universitatan profilon

Jam antaŭ unu jaro la nove elektita estraro de Esperanta Asocio de Rumanio (EAR) decidis prioritatigi la universitatan laboron. En ĝia estraro kaj komitato kun 15 membroj, triono estas universitatanoj. La unua internacie signifa konkretigo de tiu prioritatigo ĵus okazis en la urbo Timişoara en ĝia Okcidenta Universitato.Tie okazis dutaga kaj dulingva kolokvo (nov 11-12), kiu altiris tridekon da partoprenantoj el Rumanio, Germanio, Hungario, Kroatio, Makedonio kaj Serbio. Kontribuaĵoj de nepartoprenintaj alvenis el Italio, Ukrainio kaj Svislando.

Celo de UEA en la aranĝo estis prezenti proponojn por fortigi la ligojn inter la diversaj universitataj aktivaĵoj (kursaroj, prelegoj aŭ aliaj iniciatoj) kaj serĉi laborfortojn por realigi almenaŭ partojn de tiu agado.

La seminario aŭdis rapidan resumon pri la programo de UEA kaj ILEI pri la nuntempe okazanta Jaro de la Lernanto. Interveno de la prezidanto de ILEI ampleksigis la temaron de la Jaro.




La podianoj en la malfermo de la kolokvo. De maldekstre, Dekano de la invitanta fako, dr. Dana Percec, Vicrektoro: de la Universitato, dr. Irina Macsinga, Mariana Pitar, prezidanto de la kolokvo, Stefan MacGill, vic-prezidanto de UEA, Aurora Bute, prezidanto de EAR.

La plena kolokva programo aperas en alkroĉaĵo al la nuna EKO kaj konsistis el dudeko da dudek-minutaj intervenoj. Alia alkroĉaĵo konsistas el la unulingvigita prezentaĵo de la vicprezidanto de UEA pri la dezirindaĵoj de universitata kunlaboro, kies frua paŝo estos arigo de informoj pri ĉiuj ekzistantaj retpaĝoj pri universitatoj aŭ lokoj de triagrada edukado, kiu inkluzivas elementojn pri interlingvistiko, interkultura lernado, lingvo-politiko, iel en rilato kun Esperanto. Ĉiuj tiaj informoj bonvenas ĉe la prezentinto, laŭeble kun temlinia titolo, kiu komenciĝas per UNIV.



Unu el la laborgrupoj dum la Literatura Ateliero gvidita de Radojica Petrović. Plia foto sur la sekva paĝo.

## KIAM, KIE, KIO OKAZAS?

**INTERNACIA KALENDARO pri Esperanto-renkontiĝoj, kongresoj, festivaloj!**

Aktuala listo pri ĉiuj konataj Esperanto-renkontiĝoj kaj kongresoj, kiuj akceptas vojaĝantajn esperantistojn kiel partoprenantojn.

Adreso de la Kalendaro: http://www.eventoj.hu/kalendaro.htm

- Vojaĝu al Esperanta renkontiĝo! Serĉu kaj trovu simpatian aranĝon, kun datoj, nomoj, mallonga priskribo, reteja adreso ktp!
- Se mankas iu aranĝo, anoncu kaj registru ĝin senpage!
- Diskonigu, reklamu la Kalendaron al viaj Esperanto-amikoj! Bonan vojaĝon, agrablajn travivaĵojn!



Kolokvanoj ĉe la enirejo al la Okcidenta Universitato. Fotoj: Mariana Berariu.

Vortoj 470

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Por vidi pli malnovajn komunikojn iru al: www.uea.org/vikio/Komunikado_kun_LA,_FA...

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupo aŭ kialo por via ĉeesto en la ekspedolistoj.